kon kaj virinan respublikon per secesio de la virinaro. La demando estas, kiamaniere homoj kunekzistu kaj malgraŭ ĉio alparolu la maljustulojn, kun kiuj ili estas en stato de senelira konflikto. Gandhi instruis, ke la metodoj uzendaj en nia epoko devas baziĝi sur la neperforta rezistado al la malbono. De Zamenhof ni lernis, ke temas pri komunika problemo, kies solvo estas parte lingva. Ambaŭ majstroj emfazis, ke oni devas lanĉi novan tipon de konversacio kun sia malamiko, kaj ke la procezo restos dolora kaj iom ĥaosa, ĉar la homa eksplodemo kaj eksplodigemo ne malaperos per ia tuja magio, sed ke oni tamen trovos, ke per la serioza aŭskultado oni transformas sin, kaj per tio la dialogadon, kaj per tio iom post iom la aliulon, kvankam dum multaj jaroj la pliboniĝantaj ekspluatantoj tamen dolorige plu suferigados siajn viktimojn pro enostiĝinta kutimo tion fari. Mi tial volas proponi al vi, ke surbaze de tiu zamenhofa-gandhia programo la esperantista konversaciado regu unu strion de nia pensado pri la asocia laborplano, pri kiu la debatoj nun ekas. Mi poste pli detale ellaboros tiun mian ideon de ”teranismo”, el kiu mi ĵus koncizege skizis por vi unu pensfadenon: temas pri versio de la homaranismo kun media suplemento. En 2010 UEA devos formuli kaj adopti novan strategian laborplanon por la jardeko 2011-2020. Mi ĵus kuncerbumis kun vi pri kelkaj elementoj de tio, kion povas kontribui al ĝi la jubilea pilgrima etoso de la bjalistoka kongreso. Mi denove dankas, en la nomo de ĉiuj pilgrimantoj, al tiuj, kiuj nin gvidis tra kaj gastigis dum ĉi tiu unika sperto. Tre koran dankon – el niaj koroj, kiuj lernis nove kori en tiu ĉi urbo, kie oni trafis disŝuti la kongresan magion tra la kvartaloj, tra la aero, tra la arboj. En la fino, kun Grabowski, ni diru unuj al la aliaj: Agordu la brustojn!.

REZOLUCIO DE LA KONGRESO

La 94a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Bjalistoko de 25a de julio ĝis 1a de aŭgusto 2009, kun partopreno de preskaŭ 2000 homoj el 63 landoj en la jaro de la 150a datreveno de la naskiĝo de la kreinto de Esperanto, Lazar Ludwik Zamenhof, kaj samtempe en la Internacia Jaro de Akordiĝo proklamita de Unuiĝintaj Nacioj, **diskutinte** la kongresan temon “Krei pacan ponton inter la popoloj: Zamenhof hodiaŭ”, kaj studinte kun aparta atento la vivon kaj verkojn de Zamenhof, **notinte** la fakton, ke la urbo kaj regiono de Bjalistoko pli kaj pli rekonas la escepte gravan rolon, kiun Zamenhof ludis kaj daŭre ludas kiel monde rekonata figuro en la morala evoluo de la homaro, **konsciante**, ke tiu rekono konkretiĝis interalie en la malfermo de Centro Zamenhof fare de la urbaj aŭtoritatoj de Bjalistoko, kaj en propono, ke la Bjalistoka Universitato ricevu la nomon Zamenhof; **memorigante**, ke okaze de la 100a datreveno de la naskiĝo de Lazar Ludwik Zamenhof Unesko rekonis lin kiel unu el la grandaj personecoj de la mondo, kaj ke tra la jaroj venis multaj similaj rekonoj pri la meritoj de Zamenhof kiel granda monda pensulo, kaj **gratulante** Unuiĝintajn Naciojn pro ĝiaj iniciatoj rilate al la ideo de akordiĝo, tiel esenca en mondo kiun dividas malakordoj pro antaŭjuĝoj kaj manko de toleremo, **konstatas**, ke

**1**. Per la internacia lingvo Esperanto, Zamenhof kreis unike efikan ilon de internacia komunikado sur neŭtrala bazo, sen favori unu popolon super alia, kaj sen favori unu etnan lingvon super alia, kaj ke tra pli ol 120 jaroj da uzado Esperanto pruvis sian taŭgecon kiel internacia lingvo plene adaptebla kaj adaptita al ĉiuj komunikaj bezonoj.

**2**. Tamen, Zamenhof samtempe komprenis, ke lingvo estas kolektiva posedaĵo, kaj konfidis la evoluon de sia lingvo al ties komunumo de uzantoj, tiel ke Esperanto kaj ĝia kulturo fariĝis esence kreaĵo kolektiva, kiu evoluis en spirito de lingva demokrateco.

**3**. Tion farante, Zamenhof ankaŭ rekonis, ke utiligo de neŭtrala lingvo en la internaciaj rilatoj helpus konservi lokajn kaj regionajn lingvojn kaj kulturojn kaj la identecon de ties komunumoj.

**4**. Zamenhof ankaŭ signife kontribuis, per siaj verkoj kaj agoj, al klopodoj forigi la malamikecon inter la anoj de la diversaj religioj, al forigo de rasaj antaŭjuĝoj, kaj al rifuzo de milito kiel akceptebla maniero solvi disputojn – valoroj same gravaj en la nuna epoko kiel en la epoko de Zamenhof.

**5**. Sekve, Zamenhof plene meritas pli da atento ne nur kiel kreinto de lingvo sed kiel persono, kiu strebis al aŭtenta frateco inter la homoj surbaze de plena kaj reciproka kompreniĝo.

**6**. Tia frateco povas veni nur kiam la homoj interkompreniĝas en recipoka respekto – procedo, en kiu Esperanto povas ludi kaj jam ludas unikan rolon.

**7**. Interkompreniĝo estas esenca paŝo al tiu profunda kaj daŭra akordiĝo, kiu estas la celata idealo de la Internacia Jaro de Akordiĝo.

**8**. Akordiĝo eblas nur en situacio, en kiu lingvaj diferencoj ne formas baron al egaleca dialogo.

**9**. En tiu senco Esperanto estas unike taŭga kiel bazo por daŭra akordiĝo, kaj Universala Esperanto-Asocio, per sia atento ankaŭ al moralaj valoroj kaj al respekto de homaj rajtoj, povas signife roli en plenumo de la celoj de la Internacia Jaro de Akordiĝo.